Estimata,

Nome de Japana Esperanto-Instituto, mi gratulas vin ĉiujn pro la 24-a Kongreso de Ukrainia Esperanto-Asocio kaj la festa inaŭguro de la memortabulo al Vasil Erošenko, kiuj okazos en Lviv.

Ni ĵus sukcese finis la 2-an Komunan Esperanto-Kongreson de Japanio kaj Koreio en Nara de Japanio, kiu inkluzivis la 105-an Japanan Esperanto-Kongreson en la 12-14a de oktobro. La aliĝintoj estis ĉirkaŭ 530 el ambaŭ landoj kaj aliaj. La kongresa temo estis “Diverseco kaj komuneco de kulturoj - en Esperanto”.

Mi deziras, ke la kongresanoj havu ĝojan kaj fruktoplenan tempon dum la kongresaj tagoj, kaj ke la kongreso sukcesu por denuna disvolvado de Esperanto en Ukrainio.

SUZUKI Keiichiro,
Prezidanto de Japana Esperanto-Instituto